

AMO al kvar novaj landoj ĉi-jare

Stefan MacGill, Hungario

Jam okazis AMO-seminarioj 82 ĝis 85, unu en nova lando: Israelo. Iĝas ĉiam malpli facile aldoni novajn landojn, sed en 2022 tio rekorde okazos.

Jen kiom ni povas raporti pri la programo tra la sekvaj monatoj.

AMO 86 en Sidneo, Aŭstralio, en la 12a de junio. Plia nova lando por la AMO-programo. Proponita temo: "Esperanto por peri Oceaniajn kulturojn". Jam unu ero el Nov-Zelando estas. Bedaŭrinde, el la kvin personoj kontaktita dufoje, neniam venis respondo.

AMO 87 en Klaipeda, Litovio iam inter la 9a kaj 17a de julio, kadre de BET. Plia nova lando por la AMO-programo. Akceptita temo: 'Baltio en Eŭropa Kunteksto'. Aparte aktuala en la nuna malpaco en la kontinento. Hibrida seminario.

AMO 88 en Jelena Gora, Pollando, en julio 25a kaj 26a, en unu el la universitatoj. La seminario okazas lige kun la Kantkonkurso en Vroclavo. Temo certa: '135 jaroj da Esperanto – homoj, ideoj kaj okazintaĵoj'. Dua temo estas sub esploro. La loko: https://eo.wikipedia.org/wiki/Jelena_G%C3%B3ra.

AMO 89 okazos kadre de la 55a Kongreso de ILEI en Kebekio, Kanado, komence de aŭgusto. Temo: anonconta - io eduka, verŝajne pri universitata kunlaboro, kiu vere progresis en lastaj monatoj.

AMO 90 okazos lige kun la Universala Kongreso en Montrealo, Kanado. Temo: 'Kulturaj trezoroj ekster Eŭropo' kun la celo altiri ekzemplojn de indiĝenaj popoloj. Precizaj datoj anoncotaj, sed inter la 7a kaj 13a de aŭgusto. La AMO-temo rilatas al la temo de UK: 'Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj'.

AMO 91 okazos en Brescia, Italio, kadre de la Itala Kongreso. Temo: 'Sociaj retejoj – kiel starigi kaj priuzorgi ilin'. Gvidos Debora Rosseti. Aŭg 22, 23, 25, 26 (ĉiumatene inter 10:30 kaj 12:15 CEST). Hibrida seminario.

AMO 92 okazos en Togolando, sub prizorgo de ACE, inter la 2a kaj 6a de septembro. Celata, ke hibrida seminario kun temo decidota.

AMO 93 okazos kunlabori kun nia komerca faka asocio IKEF. Plejparte virtuala kun organizado el Japanio en dimanĉo la 25an de septembro. Temo: Eŭrazia Ekonomia Komunumo (EEK).

Inter oktobro kaj decembro la programo estas ankoraŭ pretigata. Sed jam certas du seminarioj: unu en Kroatio en novembro kadre de ĉiujara aranĝo kaj alia en Tieso, Senegalo, kadre de la 8a Afrika Kongreso. Temo: Interafrika kunlaboro. Senegalo estas nova lando por la AMO-programo.



Vortoj: 380

Bezonoj SMG majo 11:

Respondoj bezonataj ene de 3 tagoj por bonigi la artikolon.

AMO 86: Baza respondo ege bezonata. Ĉu mia tempropono enordas?

AMO 87: Pli precizaj datoj bonvenaj. Kiu teknike prizorgos la seminarion per Zoom?

AMO 88: Kun estas la preciza dato por la Kantfestivalo kaj por AMO?

AMO 89: Ni tuj kontaktos vin!

AMO 90: Ni nepre bezonas kontribuojn el Afriko! Kiu prizorgos tion? Jeremie aŭ iu alia?

AMO 91: En plena ordo.

AMO 92: Temo?

AMO 93: En ordo.